

El la revuo "Horizonto", p. 148-149, nov-dec. 1985.

**Kion vi ne legos aliloke**

### **KIU AGAS "MALMERITE"?**

[*Redakcia noto:* Ni publikigas fotokopie tekston, kiun D. Blanke, la ideologo de sovetiismo en UEA, aperigis en n-ro 129 de "der esperantist", kaj la reagan leteron de Prof. I. Lapenna de 12.04.85. En sia akompana letero de la sama dato Prof. Lapenna interalie skribis al D-ro Blanke:

"Aldone mi sendas leteron por publikigo en "der esperantist". Mi intence formulis ĝin tiel, ke vi povas aperigi ĝin sen kia ajn ĝeno por vi persone. Ekzemple, mi eĉ ne aludis al la demando pri kia komunismo vi parolas: sovetiisma, jugoslavia, ĉina, albania, franca..., sekve ankaŭ pri kia 'antikomunismo'? ... Plue, inter la tre multaj apogantoj de mia koncepto de aktiva neŭtraleco troviĝas ankaŭ konsiderinda nombro da komunistoj-esperantistoj de diversaj tendencoj, inkluzive eĉ membrojn de la KP-oj en la landoj de la Varsovia Pakto. Kun iuj tni eĉ estas en tre bonaj, amikaj rilatoj jam de multaj jaroj. Sed ankaŭ tion mi ne menciis, parte ankaŭ por ne kaŭzi malagrablajn al ili, se iliaj nomoj iel malkovriĝus.... Pri tiaj aferoj mi tute ne aludis, ĉar mi ne opinias, ke via periodafo taŭgas por priparoli tiajn aferojn. Krome, fakte ĉefe, tio eliras la kadrojn de la partipolitikaj influoj en UEA kaj de tnia rezisto al tiuj influoj, danĝeraj ne sole por UEA, sed, multe pli grave, por Esperanto".

Kiel oni povis atendi, D-ro D. Blanke, la respondeca sekretario de la ŝtata-partia Kulturligo de GDR (Esperanto-Asocio) kaj redaktoro de ĝia organo, samtempe komitatano de UEA, per sia letero de 14.06.85 rifuzis publikigi la ĝustigan leteron de Prof. Lapenna. Tial ĝi aperas sube]

### **Meritoj kaj malmeritoj de jubileulo**

#### **Prof. Ivo Lapenna: 75jara**

La 5an de novembro 1984 prof. d-ro Ivo Lapenna, Londono, fariĝis 75-jara. Li faris grandan kontribuon al la evoluo de la postmilita Esperanto-movado kaj ĝin influis diversmaniere. Interalie li estis la iniciatinto de la rezulucio de UNESKO pri Esperanto en Montevideo 1954. Li estis ĝenerala sekretario de UEA de 1955 ĝis 1964 kaj ĝia prezidanto de 1964 — 1974. Prof. Lapenna verkis aŭ redaktis multajn gravajn bazajn librojn en Esperanto, i. a. „Retoriko" (1950, 3-a eldono 1971), „Esperanto en perspektivo" (ĉefredaktoro, 1974) kaj multegajn artikolojn. Li fondis la Centron por Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo Pro-blemo kaj donis gravegajn impulsojn por la evoluo de UEA de verda sekto al relative mondmalferma organizaĵo. Jen la meritoj, Tamen ... Bedaŭrinde i. a. liaj fortaj antikomunistaj konceptoj "fariĝis bremsilo sur la vojo de UEA al vere universala organizaĵo. La adaptiĝemon de UEA al la fluo de la monda evoluo li misinterpretis komunisma puĉo kaj en tiu senco eĉ klopodis misinformi per nacilingvaj gazetoj la neesperantistan mondon.

Dum la elektoj de nova estraro de UEA 1974 en Hamburgo li ne reelektiĝis prezidanto kaj retiriĝis el ĉiuj funkcioj de UEA, kvankam oni

ofertis al li la honoran prezidantecon. Ekde 1975 fondiĝis tiel nomata „Neŭtrala Esperanto Movado" (NEM) kies prezidanto kaj intelekta inspiranto li ĝis hodiaŭ estas. Tiu organizaĵo, tute spite al sio nomo estas klare antikomunisma organizaĵo, kiel estas facile videbla en ĝiaj publikaĵoj. Multaj artikoloj, kalumnioj kaj ofendoj kontraŭ komunismaj kaj tute nekomunistaj funkciuloj de la aktuala Esperantomovado bedaŭrinde donis negativajn elementojn al lia vivoverko, elementojn tute sub lia intelekta nivelo kutime kaj ofte prave aprezata kiel alta.

**Malgraŭ ĉio — estas tute nedubinde, ke la rolo de Lapenna kiel teoriisto, organizanto kaj oratoro en la historiode la Esperantomovado estas de tre forta kaj parte eĉ de fundamenta signifo. Tio plene validas, ankaŭ se oni devas akre kontraŭi iujn el liaj teorioj, kalumnioj kaj misinterpretoj.** La jubileulo mem baris al si lo vojon por plumarŝi en fruktodona direkto. En tio konsistas la persona tragiko de la jubileulo. Oni lernis el la pozitivaj kaj negativaj kontribuoj de Ivo Lapenna. Espereble lia estonta agado estos tia, ke finfine restos pli forta lia pozitiva kontribuo en la memoro de la Esperantomovado.

**D. Blanke**

Al redaktoro de  
"der esperantist",  
Charlottenstr. 60,  
1080 Berlin, GDR

12.04.85

Sinjoro Redaktoro,

En der esperantist n-ro 1/85, p. 10, vi listigis nombron da "meritoj kaj malmeritoj de jubileulo" laŭ via pritakso de mia 55-jara laboro por Esperanto. Estas via rajto serĉi kaj eventuale trovi ankaŭ malmeritojn, sed vi ne rajtas inventi ion por atribui tion al mi kiel "malmeriton". *En la intereso de la vero mi petas publikigi en la sekvanta n-ro jenan korekton:*

1. Ĉiu rajtas esti komunisto aŭ antikomunisto, aŭ aparteni al kiu ajn alia politika fluo. Tio estas unu afero. Tute alia afero estas la misuzo de UEA por kia ajn partipolitika celo, unuflanke, kaj la rezisto al tia misuzo, aliflanke. Gvidataj de la principo de aktiva neŭtraleco, konforma al la neŭtrale-homa karaktero de Esperanto, mi kaj la samopiniantoj agis same en la tridekaj kontraŭ la naziisman misuzon en Germanio kaj internacie, inkluzive la Kolonjan UK (1933), kaj en la kvindekaj kontraŭ la makartisman misuzon. Kiel vi devus scii, pro tiu rezisto al naziisma, faŝisma kaj makartisma misuzo, mi estis atakata kaj denuncata al politikaj policoj de multaj landoj kiel "komunisto", eĉ "agente de Moskvo" kaj samtempe "agente de Tito"!

2. La eventojn de Hamburgo (1974) mi ne "misinterpretis" (vi eĉ uzis la insultan vorton "kalumnio"), sed objektivite prezentis surbaze de aŭtentikaj originalaj dokumentoj. Pri tio mi neniam "misinformis", eĉ ne informis, "per nacilingvaj gazetoj la neesperantistan mondon", kiel vi asertas. Male, en la intereso de Esperanto, en unusola petita intervjuo mi eĉ ne menciis la nomon de UEA. Cetere, se mi volus informi kaj science analizi, mi havus je dispono ne ĉiutagajn gazetojn, sed monde prestiĝajn internacipurajn kaj socisciencajn periodaĵojn.

3. La aserto, ke mi "ne reelektiĝis prezidanto" (de UEA en 1974) estas ripeto de plia malveraĵo. Kiel vi ne povas ne scii, la vero estas, ke mi ekŝiĝis el ĉiuj funkcioj en UEA pro la konataj eventoj kaj, kompreneble, nek kandidatiĝis, nek akceptis la proponitan honoran prezidantecon. Sekve, mi ne povis esti "ne reelektita".

4. La neŭtrala Esperanto-Movado ne "fondiĝis" en 1975, sed ekzistas ekde 1887. En 1975 ni nur daŭrigis tie, kie la gvidantaro de UEA haltis en 1974. ICNEM ne estis fondita en 1975, sed en 1980 kiel organiza centro de la neŭtrala Esperanto-Movado por pli efike agadi por Esperanto kaj la humanecaj internaciismaj ideoj nedisigeble ligitaj al ĝi. Se tion vi rigardas "antikomunismo", do daŭrigu rigardi ĝin tia.

5. Post 1974 UEA ja iom etendiĝis teritorie, parte artefarite, sed ĝi certe fariĝis malpli universala ol iam antaŭe, ĉar ĝi perdis la humanecan universalecon, tiel ke multaj intelektaj fortoj ne plu trovas lokon en ĝi. Tion, interalie, pravas la perdo de preskaŭ mil kernaj, individuaj membroj ekde 1974.

6. Fine, unu el miaj lastatempaj "pozitivaj kontribuoj" estis la propono digne memorigi la loojaran jubileon de Esperanto per komunaj fortoj de ĉiuj Esperanto-organizaĵoj surbaze de komuna agadprogramo, akceptebla por ĉiuj, en la intereso de Esperanto. Kontraŭe eĉ al siaj propraj interesoj, UEA fakte rifuzis. Kiu, do, respondecas? Kaj kiu agas "malmerite"?

Ivo Lapenna

**HORIZONTO, la laŭtparolilo de partipolitika neŭtialeco en la Esperanto-Movado, sendependa sentinelo de ties principoj, ĉiam aktuala kun daŭra historia valoro. HORIZONTO estas avide legata en la landoj kun totalismaj reĝimoj. Pagu la abonon por amik/in/o en kiu ajn el tiuj landoj, kaj la administracio prizorgos, ke ĝi atingu lin/sin.**